# *Centoj da usonanoj manifestacios kontra? migra politiko de Donald Trump.*




Washington, 20 jun(RHK) Grupoj de aktivuloj organizas protestojn en almena? 132 urboj de Usono por manifestacii kontra? la politiko de “toleremo nula” de la registaro de Donald Trump, kiu apartigas la familiojnde  enmigrantoj en la landlimo, kaj retenas infanojn.

La gazeto Washington Post raportas ke la aktivuloj manifestacios  en centraj zonoj de la ?efaj urboj de la lando. La alvokon oni faras tra la sociaj retoj kiel Facebook kaj Twitter, raportas la informagentejo ANSA.

“Ni alvokas ?iujn kiuj povas alveni al D.C. por kunveni tie”, esprimis Karthik Ganapathy, heroldo de MoveOn.org kaj kunorganizanto de la manifestacio. “Ni volas sendi  mesa?on fortan kaj premi la registaron de Trump por ?an?i tiun politikon”.

La servo de Naciaj Parkoj ricevis peton por uzi Lafayette Square en Washington DC por “manifestacio de esprimlibero kontra? la aresto de enmigrantoj” la 30-an de junio, esprimis la parolisto Mike Litterst.

(ANSA-Cubasi)

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/165046-centoj-da-usonanoj-manifestacios-kontrau-migra-politiko-de-donald-trump

**Radio Habana Cuba**